

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



54-a jaro - n° 6

Novembro 1962

Demandu provveturon per  
la nova

# Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj  
ĉirkaŭaĵoj

## GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :


DR. POL DENOËL  
BRUNO DENOËL

ISERENTANT ROGER  
POUPEYE CHARLES

COUWENBERG F.  
DE CUYPER GEORGES  
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO :

TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO  
DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377558

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD  
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 41912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEEAU SUR SAMBRE

KASISTINOJ

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT  
PORKONGRESA : PLYSON J. 23, PLACO E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2

POŝTKONTO DE B.E.F. :

1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT



## Eldonejo-librejo SONORILO

Blankenbergesteeweg, 72  
Brugge  
P.C. Nr 1521.40

Por la amatoroj de poezio ni ĉi-foje donas riĉan elekton de plej diversaj verkoj en la ĉi-suba listo :

— Animo Prisma (Sylla Chavez)	55
— Elektitaj Poemoj (Castro Alvez)	72
— Edelvejso (Nisimura Masao)	70
— Gruk (Kumbel)	35
— La Infana Raso (William Auld)	95
— La Bapto de Caro Vladimir (K. Havliček Borovsky)	80
— La Floroj de l'Malbono (Charles Baudelaire)	120
— Kvaropo (Auld - Dinwoodie - Francis kaj Rosetti)	80
— Kontralte (Marjorie Boulton)	95
— Reĥoj (Jugoslavia poemaro)	50
— Nova Ezopo (Stefo Urban)	50
— Unufingraj Melodioj (William Auld)	50
— Miniaturoj (Geraldo Mattos)	18
— Poemoj (E. Matkowski)	55
— Voĉoj de poetoj el la spirita mondo (diversaj aŭtoroj)	30
— Nur tri kolorojn (Eli Urbanova)	50
— Ombroj de la kvara dimensio (Edwin de Kock)	75
— Pinta Kraĵono (Reto Rosetti)	50
— Stupoj sen nomo (Baldur Ragnarson)	50
— Eroj (Marjorie Boulton)	120
— La Hirundlibro (E. Toller)	26
— Poeziaĵoj (Julian Tuwim)	80
— Cent Ĝojkantoj (Marjorie Boulton)	40
— Amo kaj Poezio (Jan van Schoor)	20
— Se aŭskultas la animo (Guido Gezelle)	15
— Sveda Poemaro (diversaj aŭtoroj)	65
— Streĉita Kordo (K. Kalocsay)	30
— Spegulo Homarana (Vilho Setälä)	6
— Vana Kanto (Lucien Thevenin)	25
— La alta Kanto de la Amo (Theo Jung)	5
— La Tajdo (N. Hohlov)	10
— Tra l' Silento (Edm. Privat)	10
— Rimportretoj (K. Kalocsay)	25
— Miniaturoj (G. D. Nash)	20

**Rimarko :** kelkaj verkoj el tiu listo estas elĉerpitaj ĉe la eldonejo kaj ni mem nur disponas pri kelkaj ekzempleroj. Ni do liveras ĝis elĉerpiĝo.

## 47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kongreso 4 - 11 Aŭgusto 1962

Sekvo de la raporto

### MARDO 7.8.'62

I.S.U. okazigis la prelegon de Mag. Støp-Bowitz pri la temo : **KIEL NOMI LA ORGANISMOJN ?**. Partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj. Ni resumas ĝin :

Oni kalkulas ke la biologiaj sciencoj konas hodiaŭ pli ol unu milionon da diversaj specoj de bestoj kaj pli ol 350.000 specojn de plantoj. Naciaj lingvoj, kompreneble, ne posedas nomojn por ĉiuj tiuj specoj kaj la ekzistantaj nomoj ofte estas neprecizaj. Sed scienco bezonas precizajn, unusignifajn nomojn por ĉiuj specoj kaj ankaŭ por diversrangaj grupoj de bestoj kaj de plantoj. Tial kreiĝis apartaj nomenklaturaj sistemoj, bazitaj sur la ideoj de Linné, laŭ kiuj ĉiu speco ricevas latinan (aŭ almenaŭ latininforman) nomon. Tamen, hodiaŭaj natursciencistoj malmulte regas latinon kaj en diversaj landoj oni tre malegale prononcas latinajn vortojn ; tial fariĝas ĉiam pli premaj la gramatikaj kaj ankaŭ la prononcaj malfacilaĵoj. Leviĝas la demando kiel liberigi la nomenklaturon de la gramatikaj malfacilaĵoj de la latino kaj kiel unuecigi la prononcon. Efektive estus sufiĉe facile starigi principojn, laŭ kiuj oni povus transigi la latinajn nomojn de la organismoj en Esperantan formon, konservante la avantaĝojn de la detale ellaborita hodiaŭa nomenklatura sistemo. Sed por ĉiutaga uzo la nomenklaturaj terminoj estas multe tro specialaj, necesas ankaŭ popularaj nomoj de la organismoj. La popularaj nomoj en Esperanto estas ĝis nun relative malmultaj. Ili estas parte prenitaj el la latinaj, pli-malpli lerte, parte el naciaj lingvoj. Ĝisnunaj proponoj estas ankaŭ pli-malpli hazardaj. Necesas sistema ellaborado de listoj de popularaj nomoj por bestoj kaj plantoj por ĉiutaga uzo.

**Universala Medicina Esperanto-Asocio** okazigis sian jarkunvenon, sub prezido de Prof. D-ro Hideo Yagi kaj partopreno de 18 personoj. La tagordo : Salutarolado de la prezidanto D-ro Yagi, 2. Fakaj referatoj, 3. Raporto de sekretariino D-ino M. Jarnuskiewicz, 4. Raporto de redaktoro de " Medicina Revuo " Prof. D-ro Suzuki, 5. Raporto de Medicina Terminologia Centro (D-ro Albault), 6. Liberaj proponoj.



Post salutparolado Prof. Yagi decidis ekŝiĝi pro troa okupiteco (li estas elektita prez. de LKK de UK en Tokio). Kiel nova prezidanto elektita Prof. D-ro Masao Suzuki, vicprez. Doc. Salm'hov, Sovetunio. D-ro Albault, Francujo, la sekretariino restis Dr-ino M. Jarnuszkiewicz, Pollando, kasisto D-ro G. Barasi, Britujo.

En sia raporto la sekr. sciigis ke la **UMEA-sekcioj efike laboras en Bulgario, Japanio, Jugoslavio, Pollando, Sovetunio kaj Usono**. Estas eldonita la broŝuro de Prof. Kato "La vortoj uzataj en medicino" kaj 120-paĝa libro de Prof. Nishi "Nia Korpo". En jubilea 1000 n-ro de famkonata revuo "Journal de Médecine de Lyon" de 15.XII.1961 ĉiuj interesaj artikoloj havas resumon en Esperanto (faris D-ro Albault). La mondkonata firmao "Philips" eldonis esperantlingve mallongigitan katalogon kiu donas superrigardon pri X-radioj kaj elektromedicinaj aparatoj fabrikataj de ili. La firmao dissendis la katalogon al 350 medicinistoj esperantistoj.

Redaktoro de "M.R." D-ro Suzuki informis ke en 1961 aperis 2 plujaj n-roj de tiu revuo. — D-ro Albault sciigis, ke estas pretaj anatomiaj kaj fiziologiaj terminoj por la medicina vortaro.

Oni akceptis la projekton de la Statuto de UMEA kaj la laborplanon.

**Universala Ligo** kunvenis sub gvido de S-ro T. Julin el Stokholmo. Oni sendis salutleteron al la prezidanto de UL Prof. E. Privat kaj al la ĉefsekretario S-ro Andreo Ĉe. La ĉefa diskuto de la kunveno turnis sin al la liga gazeto "La Praktiko", kiun ĉiuj trovis tre bona. Kelkaj demandoj de organiza karaktero estis pluensendataj al la liga centro en Hago.

**Bulgaraj Filmoj** koloraj (Rila-montaro, Bulgaraj popoldancoj kaj kantoj) estis prezentataj.

**Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj** okazigis publikan kunvenon kiun prezidis F-ino Dedieu kaj partoprenis ĉ. 100 personoj el 17 landoj. Unue oni donis informojn pri la agado en la jaro 1961/2. Estis interesaj informoj pri novaj teknikaj helpiloj en lingvoinstruado. En Usono oni praktikis novan magnetofonan kaj telefonan metodon, kiu donas al unu instruisto eblecon samtempe instrui eĉ tri diversajn lingvojn. Estis menciitaj rilatoj de la Ligo kun du tre gravaj neesperantistaj mondorganizaĵoj de instruistoj — FISE — kiu sendis al niaj kunvenoj saluttelegramon kaj bondezirojn, kaj CMOPE, kiu invitis observanton de la Ligo al sia jarkunveno en Stokholmo.

**Internacia Scienca Asocio Esperantista** okazigis jarkunvenon sub prezido de D-ro P. Neergaard kaj partopreno de 35 membroj. Pro la fakto ke okazas dum ĉi tiu Kongreso la nua Internacia Konferenco pri la lingva problemoj de la sciencoj, la diskuttemoj de la kunveno estis ĉefe administraciaj. La ĝenerala sekretario, Prof. B. Popoviĉ, atentigis pri la prokrastoj en la aperado de "Scienca Revuo" kaj esprimis siajn esperojn ke baldaŭ ĉio ordiĝos. Dum la diskuto oni tuŝis la problemon de la fakvortaroj, de lernolibroj, de pli trafa laboro inter sciencistoj, de la dezirindeco de universitata centro kaj de rilatoj kun dokumentaj centroj.

**Oficiala halo** okazis en la granda salono de Odd-Fellow Palæet.

## MERKREDO 8.8.'62

**I.S.U.** okazigis prelegon de Prof. D-ro Hideo Yagi pri "Valoro de Esperanto por internacia evoluo de medicino", kiun partoprenis pli ol 60 personoj. Jen konciza resumo:

En medicino la latina lingvo ludis iam rolon kiel internacia komunikilo kaj eĉ nun rezervas parton de tiu ĉi rolo en terminaro medicina, kvankam oni jam ne skribas tutan artikolon latine. Medicino estas posedaĵo universale homa kaj tial internacia lingvo estas absolute bezonata por progresiĝi medicinon en internacia kadro. Al tiu ĉi celo Esperanto taŭgis plej bone en diversaj praktikaj aferoj kaj taŭgos sendube pli efike, montrante sian specialan valoron.

**Studenta tutmonda Esperantista Ligo** okazigis sian ĉefkunvenon, kiun prezidis C. Minnaja kaj partoprenis 26 personoj. La tagordo konsistis el funebro pri mortintaj sekretario-kasisto kaj revizoro, raporto kaj diskuto pri pasinta jaro kaj elekto de nova estraro.

**Ekskurso al Carlsberg**, bierfabriko — verŝajne la plej granda en Eŭropo — okazis en kvar grupoj (kune 200 personoj). Oni regalas la kongresanojn per biero.

**TEJO** okazigis sian kunvenon sub prezido de Simeon Simeonov kaj partopreno de 17 personoj. Unue oni pridiskutis la rilatojn inter TEJO kaj ISMUN (Internacia studenta organizaĵo de UN) lige kun la letero de ISMUN kun proponoj pri kontaktoj, kunlaboro kaj eventuala aliĝo de TEJO al ISMUN. Post mallonga diskuto la kunveno esprimis rekomendon al la Komitato de TEJO esplori la eblecojn pri kunlaboro kun ISMUN (intersanĝo de informoj pri agado kaj celoj, de publikaj kaj observantoj).

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** okazigis publikan pedagogian kunvenon sub prezido de F-ino Dedieu kaj partopreno de 53 personoj. Okazis diskuto pri la temo: frua maturiĝo de lernejoj.

**Ekspozicio** per diapozitivaj kaj filmo pri forumo de Romo okazis en salono UNESKO (partoprenis 200 personoj). S-ro René LLECH-WALTER, komitatano de UEA, prezentis Esperantan Propagandan Ekspozicion per diapozitivaj faritaj de S-ro Lentaigne el Montpellier (Francujo) kaj komentis.

S-ro Pierre PETIT, komitatano de UEA kaj Honora prezidanto de Popoluniversitatoj, parolis pri la Forumo de Romo (eksperimento pri la demando, ĉu Esperanto taŭgas por internacia interkomprenigo) kaj prezentis filmon pri tiu Forumo. S-ro Petit klarigis, ke la Forumo estis granda sukceso rilate al la unua uzo de Esperanto kiel internacia lingvo ekster la E-movado. Favoraj decidoj estis unuanime aprobitaj. La prezidanto de la Itala Asocio de la Popoluniversitatoj D-ro BIANCHINI anoncis ke la Popoluniversitato de Firenze (Italujo) disdonos venontjare ŝtatajn diplomojn por la laŭreatoj de la E-kursoj.

**Libervola Teatra Vespero** okazis en teatro "Mercur City". Partoprenis proksimume 250 spektantoj. La Internacia Arta Teatro prezentis du teatraĵojn el la franca repertuaro: "La homa voĉo" de J. Cocteau kaj "La respektama p..." de J.P. Sartre, ambaŭ en tradukoj de Roger Bernard.



## JAŬDO 9.8.'62

estis la tago de la ekskursoj al 1) Norda Selando, 2) Meza Selando, 3) Atomcentro Risø, 4) Odense.

Samtempe okazis la

**Unua Internacia Konferenco pri la Lingva problemo en la scienco** sub prezido de D-ro Paul Neergaard kaj partopreno de 60 membroj kaj observantoj, inter ili elstaraj sciencistoj el 13 landoj. Krom tio kelkaj sciencistoj kiuj ne povis partopreni la konferencon kontribuis per alsendo de studoj.

Temoj pritraktitaj de la Konferenco estis esploroj pri fakta nuntempa aplikado de naciaj lingvoj en la scienco, apliko de Esperanto en maŝina tradukado, instigo al eksperimenta elprovado de elparolo de la esperanta alfabeto laŭ diversaj sistemoj, ebloj por fondi internacian universitaton kun Esperanto kiel laborlingvo, apliko de Esperanto en interdnacia publika juro kaj kompara juro, en geografio, en biologia kaj en agrikultura nomenklaturaj, en medicino, en matematikaj kaj fizikaj sciencoj kaj aliaj.

Teknika detalo koncerne al la supersignitaj literoj ĉe apliko de Hollerith-maŝinoj estis solvita, gvidprincipoj por pluaj klopodoj rilate al internacia universitato kun Esperanto kiel laborlingvo estis adoptitaj kaj studkomisiono ĉi-rilate iniciatita, la laborgrupo por nomigo de vulgarnomoj en Esperanto por bestoj estis starigita.

Oni konsideras aperigon de plena raporto en Esperanto pri la Konferenco en Scienca Revuo kaj la eblojn por aperiĝi, parte aŭ plene, la raporton ankaŭ en naciaj lingvoj.

## VENDREDO 10.8.'62

**Studenta fakkunveno** okazis por pritrakti la temon: "Porprofesia preparado de studentoj en la nuna altlernejo", prezidis J.C. Wells. La STELO-anoj en salono Grabowski pridiskutis sub la gvidado de J.C. Wells la diversajn studojn bezonataj por fariĝi instruisto. Oni aŭdis raportojn el diversaj landoj, nome Britujo, Francujo, Italujo kaj Germanujo. Evidentiĝis ke la porprofesia instruado, kvankam esence sur simila bazo, varias multe de lando al lando kaj rilate al studodaŭro kaj la preparo por tuja instrukapablo.

**Dua ĝenerala kunveno de UEA:** La kunvenon malfermis s-ro Norman Smith kiu anoncis la jenan tagordon: 1) La Estrara Raporto, 2) Raportoj de fakaj kaj aliaj organizaĵoj. Prof. D-ro Ivo Lapenna tiam skize raportis pri la enhavo de la Estrara Raporto, kiun oni finverkis en aprilo. Substrekindaj estas la jenaj punktoj aŭ pro ilia graveco aŭ pro tio, ke ili ne troviĝas en la Raporto, kiujn menciis D-ro Lapenna: La trijara laborplano de Varsovio nun finiĝis. La nova UEA-domo nun havas 5 pagitajn ĉambrojn, UEA nun havas preskaŭ 33.000 membrojn, la nova laborplano de UEA ĵus akceptiĝis.

Sekvis la raportoj de la fakaj organizaĵoj STELO, ESLI, IMRE, UMEA, ISAKE, IAJE, ISAE, kaj ankaŭ la organizaĵoj TEJO kaj SAT. Prof. Neergaard mallonge raportis pri la ĵus okazinta Scienca Konferenco, menciante ke plenaj raportoj aperos en la gazetaro. La granda plimulto de la raportoj evidentiĝis kuraĝigan optimismon pro ĝisnunaj fruktodonaj rezultoj.

## JUBILEA BENELUKSA KONGRESO

La delegitoj de « La Verda Stelo » kaj de « Rekta Vojo » kunvenis kaj formis la Lokan Kongresan Komitaton por nia Jubilea Beneluksa Kongreso, kiu okazos, en kunlaboro inter L.E.E.N. kaj B.E.F., dum la pentekostaj tagoj de 1963, nome la 1-an, 2-an kaj 3-an de junio, en Antverpeno.

Reprezentantoj de la du organizantaj asocioj estas:

S-ro H. M. Schippers                      prezidanto de L.E.E.N.  
S-ro Henri Sielens                         honora vicprezidanto de B.E.F.

La L.K.K. mem konsistas el:

S-ro Fernand Volders                     prezidanto  
S-roj Remy Van Eynde kaj  
      Jos. Lernout                         vicprezidantoj  
S-ro Jules Verstraeten                 sekretario  
S-ro René Balleux                        kasisto  
S-ro Raf. Segers                         loĝiga servo  
S-ro François Schellekens             festorganizanto  
S-ro Roger Jaumotte                    gazetara sekretario  
S-ro Ivo Durwael                         junularaj aferoj  
S-roj Rik De Roover  
      R. De Schepper  
      Jozef Montmirail                    membroj de la L.K.K.

Ĉeestos krome la kunsidojn de la L.K.K., kiel konsilantoj, la en Antverpeno loĝantaj estraranoj de Belga Esperanto-Federacio:

S-ro Maurice Jaumotte                 prezidanto  
S-ro Luc De Marré                       ĝenerala sekretario

## LA KONGRESKOTIZO

Interkonsente kun L.E.E.N. kaj B.E.F., la L.K.K. do pagigos kongreskotizon de F 100. La dua kaj kromaj enloĝantaj familianoj de aliĝinto povos aliĝi pagante nur F 75.

Ekde la fino de aprilo (t.e. dum la lasta monato antaŭ la kongreso) la kotizo de F 100 iĝos F 140; tiu de F 75; F 105.

## HOTELREZERVIGO

Malgraŭ la fakto ke hotelrezervigo estas ĉiam tre malfacila dum pentekostaj tagoj, kie ajn, la L.K.K. tamen promesas fari sian plej grandan eblon por kontentigi plene la kongresanojn, kiuj frutempe sin turnos al ĝia loĝiga servo. Ĝi tiucele antaŭvidas tri kategoriojn de hoteloj: (La cititaj prezoj inkluzivas la matenmanĝon kaj servomonon):

Kategorio I: F 360 (2 pers.)       F 210 (1 p.)  
Kategorio II: F 250                   F 140  
Kategorio III: F 200                  F 110

Specialaj kondiĉoj por tiuj, kiuj loĝos 3-4ope en unu ĉambro.



# BENELUKSA



# ESPERANTISTO

## SPECIALA KONGRESA NUMERO

DE BELGA, FLANDRA KAJ NEDERLANDA ESPERANTISTO (J)

Pli ol tri cent kongresanoj pasigis tri tagojn en Antverpeno. Skeldregino, kiel diras S-ro Vermuyten en la Beneluxa Kongreskanto.

Kaj pri la beleco de la Skeldo ĉe kiu kuŝas Antverpeno, la kongresanoj ĉiuj efektive povis konvinkiĝi dum agrabla, ripoziga ekskurso en la lunda tago.

Sed antaŭe . . . dum du longaj tagoj, ili devis travivi la restadon en Antverpeno la Senegala . . . Kaj, tion dirante, ni ne pensas pri „sen-egala”, sinonimo de „senkompara”, sed pri tropika temperaturo, kiu regis de l' mateno ĝis vespero kaj eĉ dum la nokto kaj kiu daŭre pensigis nin pri klimato en iu Senegala aŭ alia Afrika regiono.

La L.K.K., kiu efektive mendis belan veteron, akiris de la meteorologiistoj iom tro da tiu bonajo . . . Sed, kiam ni, en la tuj postaj tagoj, devis refajrigi

Flanke de la akceptoficejo estas la gazeta sekretario, en kiu prepariĝas la dokumentoj por la ĵurnaloj; kaj fine bela budo de la Institutoj belga kaj flandra, en kiu oni povas havigi al si seriojn da antverpenaj poŝtkartoj kun esperanto-klarigoj kaj ĉiuspecajn esperantajn, inter kiuj multaj leg- kaj lerno-libroj.

Ĉiuj alvenintoj estas bonvenigataj kaj helpataj de la prezidanto kaj de la membroj de la L.K.K. mem kaj baldaŭ regas en la salono tre kora atmosfero kaj ĉiuj havas la okazon interkonatiĝi aŭ rekoni amikojn kelkfoje jam de jaroj ne plu renkontitajn.

sango de la akcioj.

Poste estas akceptataj sen diskuto kaj per apartaj voĉdonoj: la Bilanco por la jaro 1952-53, la Kalkulo pri Perdoj kaj Profitoj kaj la kvitigo al la administrantoj kaj komisaroj.

S-ro Morris De Ketelaere, kies mandato de administranto finiĝas, estas reelektata por nova periodo de ses jaroj.

### Labora Kunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista

Dum, sub la gvidado de Ges-roj Debacquer kaj de F-ino Henny De Ketelaere, okazas promenadoj por la nederlandaj

## ANTVERPENO, LA SENEGALA

*Antverpeno, Skeldregino,  
Invitemas kun gastam'.*

*(„La Kongreskanto”)*

kongresoj, ankoraŭ ofte junuloj povos alporti, per sia parolo, kuraĝigon al la maljunigantoj.

### Al la legantoj!

Tiu ĉi speciala numero, eldonita kun la helpo de la L.K.K. de la Beneluxa Esperanto-Kongreso organizita de Flandra Ligo E-ista, L.E.E.N. kaj Reĝa Belga Ligo E-ista estas sendata al ĉiuj membroj, abonantoj kaj legantoj de la organoj „Belga, Flandra kaj Nederlanda Esperantisto(j) kaj al la aliaj kongresanoj!

Ĝi celas havigi al ili rapidan raporton pri la granda kaj grava Pentekosta okazaĵo en Antverpeno kaj konfirmi ĝian plenan sukceson kaj la esperon ke ĉiuj partoprenintoj kunportis el la kongresurbo la konvinkon pri la estontaj feliĉaj sekvoj.

La escepta numero ne prezentos la kutimajn rubrikojn kaj aperos iom malfrue (pro presejaj kialoj): la ĉefredaktoro ja certas pri via komprenemo kaj pardono!

Ĝi fine anstataŭas la junian numeron de „Belga E-isto” (45-a jaro), de „Flandra E-isto” (Twintigste jaargang, nr 6-227) kaj de „Nederlanda E-isto” (XVII-e Jaargang, no. 6).





## PROVIZORA PROGRAMO

La programo kompreneble ne jam estas definitive fiksita ; ĝi grandlinie tamen aspektos jene :

- Sabate :** Ekde tagmezo : Malfermiĝo de la Akceptejo  
 Posttagmeze : Vizito al fama muzeo - Interkonatiĝo  
 Je la 17a horo : Oficiala Malferma Kunsido  
 Je la 18a horo : Vespermanĝo  
 Je la 20a horo : Kultura kaj teatra vespero.
- Dimanĉe :** Je la 9a horo : Di-servoj (katolika kaj protestanta)  
 Je la 10a horo : Oficialaj kunsidoj de la du Asocioj  
 Je la 12a horo : Oficiala Akcepto en la Urbdomo  
 Je la 13a horo : Tagmanĝo  
 Je la 14,30a horo : Eventuala daŭrigo de la kunsido de LEEN. Vizito al alia muzeo  
 Je la 18a horo : Kongresa Festeno  
 Je la 20,30a horo : Kongresa Balo.
- Lunde :** Je la 9a horo : Foriro por aŭtoĉara Ekskurso al la Lando de Waes (Orient-Flandrio), kun vizitoj al diversaj pitoreskaj lokoj ĉe aŭ apud la Skeldo ; ankaŭ al la Skeld-historia Muzeo, en Rupelmonde.  
 Je la 12,30a horo : Komuna Tagmanĝo  
 Je la 14a horo : Daŭrigo de la Ekskurso  
 Je la 16a horo : Realveno en la centro de Antverpeno, tra la granda Skeldo-tunelo ; Oficiala Ferma Kunsido  
 Je la 17a horo : Laŭplaĉe : Disigo de la Kongresanoj ; aŭ Daŭrigado de la interamikiĝo en gaja sfero.

**Firma Van Iseghem & Verstraeten,**

P.V.B.A.

**ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN**

VITRALOJ - speguloj - „SECURIT“ VITRO  
 KOLORIGITAJ VITROJ  
 KLUMINIAJ senmastikaj stangoj por  
 kupoloj

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAŬOJ  
 mastiko

telefono 37.88.20

## UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

3.8 - 11.8.1963

Sofio - Bulgarujo

### kotizoj

Kategorio	ĝis 31.12.1962	ĝis 31.3.63	post 31.3.63
Kongresano	560	644	728
Edz(in)o	280	322	364
Junul(in)o ĝis 20j.	350	406	462
Studentoj (20j ĝis 30)	210	238	280
Blindulo & gvidatouj.	280	322	364
Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn :			
Kongresan(in)o	490	574	658
Edz(in)o	245	287	329

Pagu al S-ino Plyson, Bruselo, P. K. 2368.04

### karavano

#### Provizora plano :

- Foriro la 30.7.63 : Belgujo - Tübingen  
 Merkredo 31.7.63 : Tübingen - Ulm - München - Salzburg - Zell-am-See  
 Jaŭdo 1.8.63 : Zell-am-See - Jugoslavujo  
 Vendredo 2.8.63 : laŭ la prefero de la plimulto de la enskribintoj, okcidenta parto (la adriatika maro) aŭ la grandaj urboj Zagreb kaj Beograd.  
 Sabato 3.8.63 : alveno en la kongresurbo  
 Ekskursoj en Bulgarujo kaj eventuale en Grekujo :  
 Sabato 10.8.63 : Sofio - Bukaresto  
 Dimanĉo 11.8.63 : Restado en la Bukaresto  
 Lundo 12.8.63 : Bukaresto - Budapesto  
 Mardo 13.8.63 : Restado en Budapesto  
 Merkredo 14.8.63 : Budapesto - Prago  
 Jaŭdo 15.8.63 : Restado en Prago  
 Vendredo 16.8.63 : Prago - Würzburg  
 Sabato 17.8.63 : Würzburg - Hejmen

Laŭvoje, vizito de multegaj vidindaĵoj ; detaloj pri la programo en la decembra numero.

**Kostoj :** nur por la vojaĝo, do sen la restado en Sofio, sed enkluzive de la restado kun manĝaĵoj dumvoje kaj la kongreskotizo : 7000 F por persono, maksimume ; de tiu sumo, 1000 F pagotaj kiel enskribo, i.a. por la kongreskotizo.

Maertens G.



## KUNLABORANTOJ DE SONORILO.

La redakcio klopodos por aperigi la sekvantajn numerojn de la gazeto komence de la monato; tial ni ne plu petos al la grupsekretarioj kaj la aliaj kunlaborantoj por ensendi tekstojn je iu dato, sed ni preferas fiksi la limdaton de ĉiuj ensendoj je la 12-a de ĉiu monato.


Post la konsiderinda revalorigo de nia revuo el enhava kaj teknika vidpunkto ni tre dezirus ke vi povus akurate atendi « Sonorilo »-n, sed tio iel dependas ankaŭ de vi: helpu nin. Antaŭdanke,

Por la decembra numero, la limdato estas 22.12.62.

### SONORILO.



Mi pardonpetas por la malfrua alveno, Sinjoro Prezidanto



Jubileo de Paco kaj Justeco  
- Mi ne sciis ke la esperantistoj disponas pri tiom da mono Jam la sesa botelo.

## Ĉu vi konas la belan revuon «El Popola Ĉinio»?

Se ne, provu abonon por unu jaro, kaj profitu la avantaĝojn por tiuj kiuj pagas la abonon 1963 antaŭ 15.1.63.

### AVANTAĜOJ:

- tuj ĉe ricevo de via abonpago, vi ricevos belan reproduktaĵon de ĉina pentristo (46 × 33)
- je aperado vi ricevos Esperantan kalendaron (14 paĝa, formato 13 × 18, enhavante 12 ĉinstilajn pentraĵojn de famuloj).

ABONPREZO: por 1963 40 F  
por la jaroj 1963-1964 70 F

PERAS: Librejo « Sonorilo »  
Blankenbergse Steenweg, 72, Brugge  
P.K. 1521.40.

## RECENZOJ

**Animo Prisma** de SYLLA CHAVES. Orig. poemoj. Eldonis Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Rio de Janeiro, 1960. Prezo: 15 steloj.

Kiel « futurismaj » anoncitaj, la poeziaĵoj el la unua parto de la bele presita, bonpapera poemaro neniun fortimigu, ĉar ĝenerale sufiĉe konvenciaj. Mankas al ili nur la interpunkcio sed ne al majuskloj...

« Kial ĉi al mi ne diris  
ke la roz' estis mortinta  
kiam mi la buŝon ŝiris  
per kisad' al dorno pinta »

« Animo Prisma » per kvindeko da versaĵoj estas debuto de juna brazilano, cetere jam reprezentita en « Esperanta Antologio ».

La poeto, ŝajne mem kun « volupto viva de kor' naiva », nin gvidas kun « jetita koro tra l'aero », « senpluma tra l'indefinito », tra cikloj de « aspiro », « deiro », « deziro » al « deliro », ĉar « prisma animo apud la limo de pek' de krimo aŭ de sublumo », tiel ke ni iumomente kun li kontente « silente enrigardis en l'okulojn de la vivo ».

Sendube poeto talenta, eĉ diskreta li, laŭ nia sento tro prirezonante elokventa ne ĉiam konvinkas

« Glacie kaj silente sekvis  
geometrie laŭ rezono  
tenante l'ĉirkaŭkolon de l'pasi'  
sur vojo kruta inter bono kaj malbono »

Subtrahinte versojn en kiuj li tinte « ploras, floras, gloras, ĝemas, tremas, semas kaj poemas » restas havinda sumo de trafaj, fluaj versoj kun ofte individua akcento kaj vervaj esprimoj kaj bildoj;

« Tra l'branĉostaro  
en histerio  
kadavre straba luna glacio »

« Mi vegetis en la mondo kiel birdokaĝ' malplena », « mia amo libertempas kaj en brusto restas tru' », « tra la fenestro l'instinkto saltas », « kolombas koroj sed la karno vulpas », « la dormo estas falo de kurtenoj falo de kvin kurtenoj », « forgeso estas mensobalailo kaj balzam' por la trankvilo ».

En la sonetoj de la dua parto li, montrante eĉ per unusilabaj versoj sian metiistan kapablon, iufoje trafas per verstrio

« kaj de la renkontiĝa frumateno  
alternas niaj ĝojo kaj turmento  
ĉar grandajn vundojn kaŭzas granda ĝu' »

Nun ĉiu poezia verko jam estas rea pruvo pri la vivanteco de nia lingvo. Ni ankoraŭ aŭdos pri Chaves. Li estas jam pli ol promeso.

TYN.

**Otelo, la Maŭro de Venecio**, de William SHAKESPEARE. Elangligis Reto Rossetti. (Stafeto: belliteratura serio 18). Eldonis: J. Regulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1960, 208 p., 22,5 x 16 cm. Prezo broŝ.: 1,80 usonaj dolaroj.

Jen alia el inter la grandaj pasiotragedioj kiuj starigis la famon de la giganto de la angla literaturo.

Ĉi tie la jaluzo, kiun la ambicia kaj senkonscienca Jago fripone distilas en la honesta koro de la trokredema Maŭro Otelo, venenas kaj korodas ties profundan amon al sia dolĉa kaj senkulpa edzino. Ĝi nekontraŭstareble pelas la incititan Maŭron al krimo: li sufokas Desdemonan por pune venĝi sian honoron, kiun li erare kredas ofendita.

Certe ne facila estas la tasko al kiu sin jungis la tradukinto, esperantigante verkon el la 17-a jarcento, kies lingvo jam ne malmulte diferencas de la nuntempa. Pli delikataj ankoraŭ pruvigas la vortludoj, ĉe kiuj fidela traduko nur okaze sukcesas (kiel p. 68 « blonde bela » apud « fair »), dum aliloke ni devas kontentigi per preskaŭa similaĵo (kiel p. 93 la vulgara « postajo » apud la obscena



HET WELGEKENDDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUURM - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - CABARDIJNEN - LODENS  
WELVOOR MAATWEEK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RĀBATO POR ESFERANTISTOJ

« tail », aŭ p. 137 la tordita jonglado « kuŝi, tuŝi ŝian honoron » apud « lie with, lie on »).

Tio ne estas riproĉo, sed nur konstato de neevitebla manko ĉe iu ajn traduko en iun ajn lingvon. Ĉar plej precize sekvas la Esperantoteksto la originalon ĝis ekz. en la peza bombasto de Otelo, ĝis en la krudaj erotikaj aludoj al kiuj la temo mem pretigis favoran terconon.

Da fajlado tamen neniam estas tro. Eble ne multe gravas ĉu Jago putru « pograjne » aŭ « pograne » (189), aŭ se « Maŭritanio » ŝanĝiĝis je pli moderna « Maroko » (164), eĉ se pro « Maŭro » la unua landnomo ŝajnas konservinda. Sed « to suckle fools and chronicle small beer » pli ĝuste sugestas « mamnutri idiotojn, babilaci » (69), « invito » (77/10) tro malfortas por « provocacion », dum « malfari » (107) ne respondas al « leave it undone » kaj « putoro kiu bele ardas, sed kiu bonodoras » (143) pli fidelas.

Generale la leganto aprezas kiel eble plej laŭvortan tradukon, ĉar per ĝi li esperas pli intime proksimiĝi al la originalo ol per iom tro libere reverkita versio, eĉ se laŭ artisma vidpunkto tre merita. Li emas pli fidi prozan transdonon de versigita teatraĵo, en kiu ĉefas la senca enhavo, ĉar for de la rigoraj reguloj de rimado kaj metriko, la tradukanto sin tute povas dediĉi al la nura enhavo.

Sed R.R. volis ankaŭ la formon reprodukti kaj laŭ la modelo de la originalo uzi jen prozon, jen versojn: rimajn, senrimajn. Tiam levigas tamen plia malfacilo. Kontraŭe de Esperanto, la angla ja eksterordinare riĉas je unusilabaj vortoj. Kiel do eblus kunpremi enhavoriĉan verson anglan en Esperantan, obeante la postulojn de ritmo kaj versolongo? Hazarde elektita ekzemplo (p. 39).

« O thou foul thief, where hast thou stow'd my daughter ?

Damn'd as thoy art, thou hast enchanted her ; » k.t.p.)

« Fia rabisto, kien vi forkasis

Mian filinon ? Certe vi damnita,

Sorĉe delogis ŝin. » K.t.p.

montras, ke okaza transpaŝo al sekvanta linio, malofte aldonita verso kaj precipe la virtuozecko de la tradukinto solvis la problemon.

Ne ĉiam egale glate tamen. Verdire, ne ĉiam gravas se pro ritmo aŭ rimo kelkfoje alia traduko ol laŭvorta sin altrudas, se « endless » fariĝas « pompaj (riĉoj), (106), aŭ « sycamore » « pinio » (167), se ni legas « rado » (114) anstataŭ « torturstablo », aŭ « pigo » (142) anstataŭ « simio ».

Sed povas okazi, ke deviga densigo de la teksto mistifikas la plej lertan. Kaj jen lia traduko perdas esprimforton: « My lord shall never rest / I'll watch him tame and talk him out of patience. » kontraŭ: « mia edzo ne ripozos / Nek dormos, ĉar mi ĉie lin admonos. » (98).

Jen ĝi seniĝas je sia gentila eleganteco: « So please your grace, my ancient. » por fariĝi lakona « Jen, mia kornedo » (54).

Jen ankoraŭ ĝia koncizecko ĝenas ĉe la spektantoj la tujan kompreneblecon tamen dezirinda ĉe reprezentado de teatraĵo. Ekz. « Kio ? » (174) (What is the matter ?), « Estas io » (130), (there is matter in it indeed). Aŭ ĝi perpleksigas eĉ la leganton: « Ili estas de amo. » (182), (They are loves I bear to you.); « Li ĉsas » (138), (He stirs.).

Sed estus maljuste nur kribri la tekston kaj svingi lupeon por malkovri makuletojn, ne substrekante samtempe la elstaran kvaliton de la traduko de R.R. La literaturamanto nepre ne maltrafu ĉi tiun unikan okazon senpene ĝui la ĉarmojn de ĉi tiu majstroverko en la spirito de ĝia aŭtoro.

F. COUWENBERG.

Sam WAAGENAAR « Infanoj ne konas limojn ». 40 paĝoj da teksto kaj 111 fotoj. Eldonis A.W. Bruna en Zoon en Utrecht. Prezo: 11.80 steloj.

Post enkonduko de Dr. I. Lapenna kiu substrekas ke tiu-ĉi fotolibro ankaŭ diskonigas la orienton en la okcidento (memoru la grandan projekton de la UNESCO tiurilate), Sam Waagenaar rakontas pri la malfacilaĵoj por foti infanojn. Tri aliaj konataj verkistoj, Heinrich Böll, Georges Simenon kaj Ito Saburo iom filozofias sur kelkaj paĝoj pri la infaneco. Sed kiam oni poste rigardas tiujn infanfotajn oni konscias kiom malriĉa estas ilia filozofiado en komparo kun la riĉeco de la esprimoj sur la fotoj. Certe S. Waagenaar liveris artverkon per tiu fotokolekto. Kiaj ravaj, foje trafaj, foje animmalkvietigaj, foje ĉarmegaj infanvizaĝoj ! Oni vere ne povas resti sen emocio vidante tiujn kapetojn kaj tiujn okulojn, tiujn okulojn ! Vole, nevole oni devas ami la infanon. Infano estas ankoraŭ bela kaj bona kaj vera. Oni deziras havi tiajn infanojn ĉe si; kaj helpi ilin. Lastaj detaloj: eldono tre zorgita kaj prezo tre malalta.

F. R.

## NI REMEMORIGAS...

LA KOTIZOJ PAGOTAJ DE LA INDIVIDUAJ MEMBROJ ESTAS POR 1963 LA JENAJ :

BONFARA MEMBRO	150 F
MEMBRO (KUN ABONO)	100 F
FAMILIA MEMBR(IN)O	50 F
JUNULOJ (18 ĜIS 21-JARA)	50 F
KADETO (ĜIS 18-JARA)	25 F
KURSANOJ	50 F
ABONOJ	80 F

POŝTKONTO

B.E.F. N° 163434 RAAPSTRAAT, 72 GENTO

MEMBROJ DE GRUPOJ TAMEN PAGU AL SIA LOKA KASISTO

AFIŝOJ DE UEA : 3 F PO EKZ. SAMA POŝTKONTO

<p><b>G. FAES</b></p> <p>Eiermarkt, 21 ANTVERPENO</p> <p>★ Por via MUZIKO RADIO kaj GRAMOFONO</p>	<p>LES ENTREPRISES</p> <p><b>DERKS</b></p> <p>226, Rogierstrato, BRUSELO Tel. : 15.19.92</p> <p>Entrepreno de KONSTRUAĴOJ</p>
---	---



## GRUPA VIVADO

### KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA

Reĝa Societo

66, Strato Vandervelde, CHARLEROI

#### JUNIO

La 5an : kiel antaŭvidite estis projektataj 2 filmoj, en Esperanto, komentitaj de S-ro Paulus.

La 17an : Gedinne estis la celo de nia monata foriro: la belaj arbaroj de la Sud-namura provinco, apud la franca limo, multe plaĉis al ĉiuj partoprenantoj.

La 19an : dum tiu kunsido, ni vidis diapositivojn pri la Kastelo de Grésillon, franca esperantejo kies viziton ni konsilas varmege — Komentoj de F-ino Orsolini.

#### JULIO

La 3an : ni vidis la hungaran filmon pri Budapesto, la vidaĵoj estis skribe komentitaj en Esperanto. S-ro de Kegel prezentis kaj komentis filmojn pri siaj libertempoj.

La 15an : Nia monata ekskurso celis Profondeville kie ni multe ŝatis la nacian ĉampionecon de riverskioj.

La 31an : Ni ricevis kun granda plezuro nian jugoslavan amikon S-ro Jutriĉa, kiu trapasis Karloreĝo'n vojaĝante ĝis la Internacia Kongreso (li estis gvidanto de la Infana Kongreso).

#### AUGUSTO

La 28an : Ni rekomencis la renkontojn de la Grupanoj en Marchienne, ĉe la Prezidanto, por prepari la proksimajn agadojn.

#### SEPTEMBRO

La 2an : Nia monata promonado gvidita de S-ro Paulus permesis al ni la ektrovo de la ĉarma valetto de la « Yvette » (ĉirkaŭaĵoj de Walcourt).

La 7an : Ni surbendigis folklorajn tekstojn kaj muzikojn por aŭstralia samideano kiu sendis antaŭe tre interesan bendon pri lia nacio.

La 11an : En nia urbdoma salono, ni aŭdis paroladon de S-ro Delforge pri « Esperanto » kiu interesis la partoprenantojn tiom la ne-esperantistojn kiom la esperantistojn.

La 12an : Anoncita en 8 ĵurnaloj kaj per 75 afiŝoj, la nova semajna kurso komencigis kun 6 lernantoj, en Karloreĝo. S-ro Devillez estas nia nova kursgvidanto.

La 14an : S-ro Devillez paroladis en Courcelles por kelkaj 25 personoj kaj li havis grandan sukceson, ĉar :

La 21an : li komencis novan du-semajnan kurson en Courcelles kun 8 junaj lernantoj.

La 15/16an : Fino Orsolini partoprenis la Trilandan Renkontiĝon kaj faris surbendigitan raporton kun granda entuziasmo dum la sekvanta kunveno de la Grupo.

Kunvenoj de la Grupo :

ĉiusemajne — mardon 7a.30 : unufoje en la Urbdomo de Charleroi (Salono n° 4), unufoje en la Grupejo, en Marchienne.

### Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S. P. R. L.

Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj :

TABULO, por lernejtabuloj ; KATOKULO, por signalvitroj.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI  
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI  
AĈETAS ĈE

## STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559

detala " 33408

STROVI estas unuaranga!



★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ  
TRANSPAGOJ

★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA  
KURZO

★ POR VOJAĜDEVIZOJ

Bank van Roeselare & Westvlaanderen

Sidejo : ROESELARE

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.



manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj  
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



### PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenterstr. 2
	Abdijsstr. 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2